

**JESUO KIEL ELIJA KAJ ELIŜA ESTIS SENDITA NE NUR POR LA JUDOJ –
Komentario al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM**

Lk. 4, 21-30

En tiu tempo Jesuo ekparolis en la sinagogo: “Hodiaŭ tiu skribo kiun vi aŭdis plenumiĝas”.

Kaj ĉiuj atestis pri li, kaj miris pro la vortoj de graco, kiuj eliris el lia buŝo; kaj ili diris: Ĉu ĉi tiu ne estas la filo de Jozef? Kaj li diris al ili: Sendube vi diros al mi la jenan sentencon: Kuracisto, sanigu vin mem; kiajn aferojn, pri kiuj ni aŭdis, en Kapernaum faritajn, tiajn faru ĉi tie en via patrujo.

Kaj li diris: Vere mi diras al vi: Neniu profeto estas akceptata en sia patrujo. Kun vereco mi diras al vi: Estis multaj vidvinoj en Izrael en la tagoj de Elija, kiam estis ŝlosita la ĉielo tri jarojn kaj ses monatojn, kiam okazis granda malsato sur la tuta lando; kaj al neniu el ili Elija estis sendita, krom al Carfat en la lando Cidon, al virino vidvino. Kaj estis multaj lepruloj en Izrael en la tagoj de la profeto Eliŝa; sed neniu el ili estis purigita, krom Naaman, la Siriano.

Kaj ĉiuj en la sinagogo pleniĝis de kolero, aŭdante tion; kaj leviĝinte, ili elĵetis lin ekster la urbon, kaj kondukis lin ĝis la krutaĵo de la monteto, sur kiu ilia urbo estis konstruita, por ĵeti lin malsupren. Sed li foriris, trapasinte tra ilia mezo.

La 4a ĉapitro el la evangelio laŭ Sankta Luko kun Jesuo kiu la unuan fojon eniras sinagogon, bedaŭrinde estas distranĉita laŭ du sinsekvaj dimanĉoj, tiumaniere oni senigas ĝin je la tuta patoso kaj emociiga efiko.

Jen ĉi tie la dua parto el ĝi, Jesuo proklamis la vorton de Dio laŭ la profeto Jesaja, sed li ne preparolis la venĝon al la paganoj, kaj la evangeliisto skribis ke: “la okuloj de ĉiuj en la sinagogo atente lin rigardis”. Do estas etoso je granda streĉiteco.

Nu, la evangeliisto skribas: "Ĉiuj atestis pri li". Jen la verbo "atesti", ĝi en la greka lingvo estas μαρτυρέω kiu signifas "atesti, doni ateston", laŭ la kunteksto ĝi povas signifi ateston favore al iu aŭ atesto kontraŭ iu. Ekzemple la saman verboformon ni trovas ĉe la 23a ĉapitro de la Evangelio laŭ Sankta Mateo, en la versego 31a, kie Jesuo diras: "Tial vi atestas pri vi mem", li sin turnas al skribistoj kaj al fariseoj. Tiam ĉi tie tiu "atesti" ne estas favora atesto, sed ni devas ĝin traduki per: "kaj ĉiuj estis kontraŭ li". Ili kontraŭis Jesuon ĉar li ne legis la tagan legaĵpecon kaj ili kontraŭis lin ĉar Jesuo cenzuris la profeton Jesajan kie li priparolas la venĝon al la paganoj.

Do ĉiuj kontraŭis lin "kaj miris", nome ili skandaliĝis, "pro la vortoj de graco". Jen la versego per kiu Jesuo finis sian antaŭan paroladon temis pri la favorjaro de la Eternulo. Jesuo daŭrigas paroli pri graco, nome pri la libero de Jesuo kiu sin turnas al la tuta homaro, ĝi ne estas apartaĵo por iu popolo, sed ankaŭ la paganoj estas la celo de tiu liberigo. Ĝi estas tio, kion la nazaretanoj ne akceptas.

Do, "ili estis skandaliĝintaj "pro la vortoj de graco, kiuj eliris el lia buŝo; kaj ili diris: Ĉu ĉi tiu ne estas la filo de Jozefo?". Ili ne pridubas la patrecon de Jesuo, la fakton ke Jozefo estis lia patro, la evangeliisto skribas ke "li estis filo de Jozefo, laŭ komuna opinio", sed "filo" en la hebrea mondo estas kiu similas la patron pro la sinteno kaj pro la ideoj. Nu, Jesuo nenion komunan havas kun sia surtera patro.

Do la evangeliisto komprenigas al ni ke eĉ Jozefo konsentis la naciismajn idealojn de la nazaratanoj. Nu, Jesuo fronte al tiu ĉi kolerega reago flanke de ĉiuj sinagoganoj, ne nur ne serĉas rimedon, sed li tuŝas la dolorpunkton. Li pikas la vundan lokon citinte du epizodojn kiujn la izraela tradicio preferis prisilenti, nome la enmiksiĝo de Dio favore al paganoj. Tio estis netolerebla afero.

Tiam li daŭrigas kaj diras: "Sendube vi diros al mi la jenan sentencon: Kuracisto, sanigu vin mem". Kaj tie estas reeĥo el tio kion ili diros al Jesuo kiam Li estos sur la kruco: "Li savis la aliulojn, nun li savu sin mem!".

"Kiajn aferojn, pri kiuj ni aŭdis, en tiu Kapernaum faritajn", la evangeliisto uzas tie la malestiman vorton ĉar Kapernaum estis landlima urbo, kun loĝantaro miksitaj je paganoj, do ĝi estis rigardata malestime de la denaskaj nazaretanoj, "tiajn faru ĉi tie en via patrujo!".

Kaj poste li diris: "Vere mi diros al vi: Neniu profeto estas akceptata en sia patrujo". Ĉi tie la patrujo simbolas la lokon de la tradicio, la loko de la religiaj idealoj kaj kiam la profeto interpretas kaj anoncas la volon de Dio rilate al la novaĵo, rilate al la nuno, li ĉiam estas rifuzita. Kaj tie, do, kiel jam ni diris, Jesuo tuŝas la dolorpunkton kaj Li citas du epizodojn.

Tiun pri la fama izraela malsato en la epoko de Elija, nu Elija, la profeto sendita de Dio, kien li iris? Ĉu li iris ĉe iun en Izraelo? Ne ! "Li iris al Carfat en la lando

Cidon, al virino vidvino”, temas pri la nuna Lebanono. Do, la agado de Dio okazas ankaŭ favore al paganoj. Same por la plago de la lepro, Jesuo diras: “estis multaj lepruloj en Izrael en la tagoj de la profeto Eliŝa; sed neniu el ili estis purigita, krom Naaman, la Siriano”.

Nome tiuj paganaj popoloj, historiaj malamikoj de Izraelo, eĉ al tiuj ĉi estas destinita bonfaro de la Sinjoro, ĉar Dio ne havas preferojn, lia amo sin turnas al la tuta homaro. Nu, post kiam li citis Elijan kaj Eliŝan, du profetojn kiuj agis favore al la paganoj, jen pro lasta guto okazas elverŝo!

“Aŭdante tiujn ĉi vortojn, ĉiuj...”, temas pri la samaj “ĉiuj” kiujn ni vidis supre, ĉe la 22a versego kaj kiuj kontraŭis lin, ĉiuj pleniĝis de kolero”, laŭvorte “ili tumultis”, “Leviĝinte, ili elĵetis lin ekster la urbon”, temas pri la loko de la ekzekutoj, kie Jesuo estos mortigita, ekster la urbo de Jeruzalemo, Sankta Stefano, la unua kristana martiro, estos mortigita ekster la urbo... “Kaj ili kondukis lin ĝis la krutaĵo de la monteto, sur kiu ilia urbo estis konstruita. La urbo konstruita sur la monto estis Jeruzalemo, kiu estis konstruita sur la monto Ciono, tiam la evangeliisto ĉi tie unuigas Nazareton kaj Jeruzalemon, li unuigas la unuan provon mortigi Jesuon kaj la urbon kie okazos Lia mortkomdamno.

“Por ĵeti lin malsupren”, do la unuan fojon kiam Jesuo eniras en sinagogon, la anonco de tiu universala amo de Dio, amo kiu ne rilatas al privilegiita popolo, sed rilatas al la tuta homaro, ĝi renkontas reziston, koleron, kaj ĝi eĉ renkontas violenton.

“Sed li, trapasinte tra ilia mezo, tiu estas simbola bildo kiu bildigas la resurekton de Jesuo, ili mortigos Lin, sed Li daŭrigos sian ekzistadon, “Li foriris”. Rifuzita de Izraelo poste Jesuo turnos sian mesaĝon de amo ankaŭ al la paganaj popoloj.